# Jura Semajno


Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Novembro : 3 2022


## NEDERLANDA TRIBUNALO SCIIGIS SIAN JUĜON PRI LA FALIGO DE LA AVIADILO MH-17

Ĉi-semajne, la nederlanda tribunalo, kiu pristudas la faligon de civila aviadilo fluganta super Ukrainio en la jaro 2014, juĝis ke tiu aviadilo estis faligita de misilo fabrikata kaj havigata de Rusio al separistaj trupoj de la Popola Respubliko de Donecko, siafoje kontrolitaj de Rusio. Pro tiu agado mortis 283 pasaĝeroj kaj 15 deĵorantoj.

La tribunalo kondamnis tri homojn (du rusojn kaj ukrainon) al dumviva enkarcerigo kaj al pago de 16 milionoj da eŭroj, kiel reparacio al aer-kompanio kaj al familianoj de la viktimoj. Tamen, la akuzitoj fuĝis en Rusion kaj tie ili estas protektataj de la rusia registaro. Laŭ la juĝo, doneckaj separistoj faligis la aviadilon erore, ĉar ili kalkulis, ke temis pri ukraina milit-aviadilo. La tribunalo ankaŭ deklaris, ke la Rusa Federacio havigis apogon, armilojn kaj monon al separistoj de la regiono Donecko, luktantaj kontraŭ la ukraina registaro. Unuamomente, separistoj de Donbacko eĉ fieris pri la tiu milita ago, ĉar ili pensis ke temis



pri milita aviadilo de la ukriana armeo, tamen kiam ili alvenis en la ĝustan lokon kie troviĝis la restaĵoj,ili vidis nur valizojn kaj kadavrojn de civiluloj, multaj el ili infanoj. Tiam, ili respondecigis la ukrainojn de tiu ago.

La jura proceso komenciĝis antaŭ pli ol du jaroj, kiam Rusio vetois krei specifan tribunalon de UN por pristudi ĉi tiun kazon. La ministerio pri eksterlandaj aferoj de Rusio ĵus deklaris, ke oni studos atente la juĝon de la nederlanda tribunalo. Kiel dirite, la foresto de la akuzitoj, nun kondamnitoj, malebligas la sukcesan realigon de la juĝo. Tamen, ĉi tiu juĝo estis grava, ĉar eble temas pri skizo de ontaj procesoj kontraŭ Rusio pro eblaj milit-krimoj dum la nuntempa milito en Ukrainio.

# Vorto de la Semajno

## Bankroti (tr):

Ĉesigi la pagon de siaj ŝuldoj pro nepagipovo leĝe konstatita.

**Bankroto:** Leĝa agnosko kaj reguligo de la nepagipovo de ŝuldanto, kies aktivojn oni metas sub tribunalan kontrolon, por posta likvido favore al la kreditoroj.

**Bankrotinto aŭ Bankrotulo:** Iu bankrotinta.

**Deklari bankroton:** leĝa konstanto de tiu situacio.

**Proceduro de bankroto:** maniero en kiu leĝo kondukas aferojn por deklari bankroton.

**Senkulpa bankroto:** Tiu nepagipovo ne kaŭzita pro riproĉindaj aŭ punindaj agadoj de la bankrotinto.

**Fraŭda bankroto:** Okazas kiam bankrotinto kaŝas proprajn aktivojn aŭ havaĵojn, pere de kiuj oni povus pagi la ŝuldojn.

Sinonimo: *Kraŝo, Ruiniĝo.*

*Entreprenoj, komercistoj kaj eĉ ŝtatoj povas bankroti.*

---

Venontsemajne aperos la numero 21-a de la revuo

***JURA TRIBUNO INTERNACIA***

Oficiala organo de Internacia Jurista Esperanto-Asocio.

La revuo estos sendata rete al ĉiuj membroj de la asocio kaj la surpapera versio, nur al tiuj kiuj petos ĝin. Do, se Vi deziras ricevi en via hejmo tiun revuon, bv. kontakti kun ni por informi pri via poŝta adreso.




jurista@esperanto. ac